

forto ke Alicio eksaltis; sed ŝi tuj komprenis ke la Dukino alparolas ne ŝin sed la infanon: do ŝi refariĝis kuraĝa kaj daŭrigis:—“Ĝis nun mi ne sciis ke la *Ceŝŝa* katoj ĉiam grimacas; mi eĉ ne sciis ke ili havas tian kapablon.”

“Ĉiuj havas la kapablon” diris la Dukino “kaj la plimulto praktikas ĝin.”

“Mi mem ne konas eĉ unu praktikantan” diris Alicio, eksentante kun ĝojo ke jam fine komencas por ŝi vere interesa konversacio.”

“En tiu okazo, oni povas certiĝi ke vi tre malmulte konas” akre respondis la Dukino.

Ĉi tiun diron Alicio tute ne ŝatis, kaj tuj eksentis fortan deziron proponi alian temon. Dum ŝi penis trovi ion taŭgan, la kuiristino levis la kaldronon for de la fajro kaj komencis vigle ataki la Dukinon kaj la infanon; komencante per la fajriloj, ŝi ĵetis sur ilin ĉion atingeblan, ĉion ĵeteblan. Flugis tra la aero unu kaserolo, kaj kelkaj pladoj, kaj kvazaŭ hajlis per teleroj.

Tiujn eksterordinarajn ĵetaĵojn la Dukino ne atentis, eĉ kiam ili frapis ŝin, kaj la infano jam antaŭe tiel forte kriegis ke oni ne povis sciigi ĉu ĝi ricevas vundojn aŭ ne.

“Ho, rigardu, zorgu, — mi petegas — la infanon!” Alicio ekkriis.

Ŝi saltadis agonie. “Ho, ve! oni fortranĉos la amindan nazeton” — ĉar en tiu momento

granda kaserolo preterflugante minacis forporti ĝin.

“Se ĉiu volus atenti nur *siajn* aferojn” diris la Dukino per raŭka malagrabra voĉo “la mondo rondirus multe pli rapide.”

“Kaj tio ja estus nur *malutilo*” diris avide Alicio, profitante la okazon montri sian astronomian instruitecon “Ni konsideru kiel terure tio efikus sur la tagdaŭro. La Tero turniĝas en la daŭro de dudekkvar horoj; se do ĉirkaŭ la akso<sup>1</sup>—”

“Ŝi parolis pri akso” diris interrompante la Dukino “do per akso dehaku al ŝi la kapon.”

Alicio ne sen timo observis la kuiristinon por sciigi ĉu ŝi volos plenumi la dukinan ordonon. Sed la kuiristino klopodadis pri la supo kaj ŝajne ne aŭskultis. Sekve Alicio kuraĝis daŭrigi: “La daŭro estas dudekkvar horoj, mi *kredas*, aŭ ĉu eble dekdu? Mi—”

“Ho, pri tio vi ne enuigu *min*” diris la Dukino “ĉar neniam mi povis toleri la ciferaĉojn.” Kaj ŝi rekomencis varti la infanon, kantante al ĝi strangaspecan lulkanton, kaj ĉe ĉiu linifino ŝi forte skuis la kompatindan etaĵon:—

*Vi forte skuu la infanon,  
Ne traktu kondolence!*

<sup>1</sup> En angla lingvo, “akso” havas ankaŭ la signifon “hakilo.”

